

Historio pri la internacia lingvo
La tri konsekvencoj de la ruiniĝo de Volapük
Claude Gacond, 231-a radioprelego, 1968.03.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La subita fiasko de Volapük en 1889 havis ĉefe tri konsekvencojn. Unuflanke la ruiniĝo de la volapüka afero vekis negativajn antaŭjuĝojn pri la fakto mem de la ekzisto-povo de internacia lingvo. Sed ĝi samtempe kaŭzis malplenon, kiun esperanto havis la privilegion eblon reokupi. Trie rezultigis ĉe lingvistoj kaj eksvidantoj de la volapüka movado serĉadon al lingvo internacia, en kiu nenio estu elpensita. Naskiĝis interlingvista skolo, kiu donis al si la etiketon **naturalista**.

A.- Tiuj tri konsekvencoj klarigas multajn postajn okazintajojn. Pro tio ni ilin iom detale pritraktos dum la hodiaŭa elsendo. Kaj por ne resti tro supraĵaj, dum kelkaj venontaj elsendoj ni turnos niajn rigardojn al la lingvo Volapük mem. Kiel Zamenhof diris en sia parolado antaŭ la sepa Universala Kongreso en Antverpeno okaze de la okdekjariĝo de Johann-Martin Schleyer:

Cl.- « *La prelato Johann-Martin Schleyer [...] estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi ; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si : por lingvo internacia mi volas ne revii, sed labori ; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan movadon. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare ; ĝi pereis per si mem en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki ; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas al kutimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela. [...] Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis : **absoluta manko de natura evoluipovo.** »*

A.- En nia studo pri la disvastiĝo de la internacia lingvo ni devos provi kompreni la kialon de la eksterordinara ekviglo de la volapükismo kaj priskribi la kaŭzojn al ĝia drama ekruiniĝo.

Cl.- Kelkaj ciferoj donos al vi ideon pri la disvastiĝo de Volapük. Unu jarlibro eldonita en 1889 ĵus antaŭ la krizo permesas nombri la verkojn parolantajn pri aŭ skribitajn en la lingvo de Schleyer. Tiu *Yelabuk pedipedelas*, pri kiu ni reparolos, donas tiun statistikon :

A.- En 1883 aperis 2 verkoj en aŭ pri Volapük.

Cl.- En la sekvanta jaro 1884 6 verkoj.

A.- En 1885 23 verkoj.

Cl.- En 1886 46.

A.- En 1888, la jaro antaŭ la fama krizo, 146 verkoj aperis. Tio signifas po 2 titoloj en ĉiu semajno.

A.- Plej multaj el inter tiuj verkoj perdiĝis. La morto de la lingvo, ties aspekto mem de sekreta kodo, faris, ke raris la kolektantoj pri volapükaĵoj. La restaĵoj, kiuj troviĝas en la nunaj arkivejoj, estas specoj de mutaj fosilioj, kiuj atestas pri la dinamismo de la adeptoj de Schleyer. Ni provos paroligi kelkajn el ili, kiuj fuĝis en la Centron de Dokumentado kaj Studado pri la Lingvo Internacia de la publika Biblioteko en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Ni revenu al la tri konsekvencoj de la subita drama fiasko de Volapük.

A.- Johann Schleyer disvastigis sian lingvon ĉefe en mediojn komercistajn, altklerajn kaj katolikajn. Centoj da komerc-oficistoj, da profesoroj kaj da pastroj akceptis oferi multe da tempo kaj da mono por la propagando de Volapük.

Historio pri la internacia lingvo
La tri konsekvencoj de la ruiniĝo de Volapük
Claude Gacond, 231-a radioprelego, 1968.03.13 & 16

Cl.- Ili eldonis grandkvante vortarojn, lernolibrojn, varbilojn. En 1889 ege gravaj sumoj devis esti investitaj en la volapüka librokomerco. Multnombraj estis la komercistoj, kiuj aperigis anoncojn en la volapüka gazetaro.

A.- Tiuj oferoj ne estis rekompensitaj. Multaj profesoroj, pastroj kaj instruistoj, kiuj tiam gvidis kursojn, eldonis revuojn, vivigis grupojn, estris varbkampanjojn, sentis en la fiasko de Volapük personan fiaskon. Antaŭ 1890 esti volapükisto signifis en multaj rondoj esti modernulo. Post 1890 viktimo de miraĝo.

Cl.- Multaj volapükistoj sentis sin malhonorigitaj. Pro tio ili provis sin publike rehonorigi per aktiva kontraŭstaro al la ideo mem de internacia lingvo. Ili forĝos sloganojn inspiritaj de la afero Volapük direktotajn kontraŭ esperanto. Tiuj asertoj sonos false en la oreloj de la esperantistoj, sed ili efikos super la publiko kaj ofte bremsos la progresojn de la nova lingvo.

A.- Ili diros :

Cl.- « *Artefarita lingvo lamigas la penson !* »

A.- « *Artefarita lingvo estas senviva monstro, kiu ĝin lernas malakrigas sian mondpercepton !* »

Cl.- « *Elpensita lingvo estas io nenatura, kio ne povas konveni al la homa cerbo !* »

A.- « *Kreita lingvo nepre fiaskos, ĉar per ĝi oni povas nur traduki, sed ne verki.* »

Cl.- Svisa historiisto nomata Gonzague de Reynold ĉerpos el tiuj asertoj kaj forĝos en 1922, por malhelpi la progresojn de esperanto en Ligo de Nacioj, tiun ĉi vipan sloganon :

A.- « *En esperanto oni povas ĉion traduki, sed nenion esprimi !* »

Cl.- Sed la malapero de Volapük ne lasis nur eksgvidantojn, kiuj sentis sin malhonorigitaj. Ĝi lasis soifon al lingvo internacia. Ĝi lasis kutimojn pri loka grupa vivo. Volapük malallogis multajn personojn pro sia akreco kaj artefariteco. Esperanto trovos tiel kondiĉojn, kiuj favoros ĝian disvastiĝon. La volapükista propagando frapis ĉe multaj pordoj. Kiam ili malfermiĝos, tiam estos la horo de esperanto.

A.- Lingvistoj kredis trovi la kaŭzon de la fiasko de Volapük en ties artefariteco. Pro tio formiĝos interlingvistika skolo, kiu provos verki absolute naturan internacian lingvon. Ĝia unua naskito estos la lingvo **Idiom Neutral**. Poste ĝi esprimos sin tra **Latino sine flexione**, **Occidental** kaj **Interlingua**. En tiu skolo oni heredos atakemon kontraŭ la lingvo esperanto, kiu anstataŭis Volapükon. Tiu agresemo kontraŭ la biologia fakto donas diletantan karakteron al la studoj de tiu naturalisma skolo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 2-a parto
Aspekto de Volapük
Claude Gacond, 232-a radioprelego, 1968.03.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni promesis al vi rigardon al la lingvo Volapük por provi komprenigi al vi, kio tiom entuziasmigis la adeptojn de Johann-Martin Schleyer dum deko da jaroj kaj kio subite malhelpis la lingvon plue progresi.

A.- Hodiaŭ ni diros kelkajn vortojn pri la aspekto mem de Volapük. Venontajn semajnojn ni poste priskribos la volapükan konstruadon. Kaj ni finos tiun rapidan studon per priskribo de la disvastiĝo de tiu antaŭlo de esperanto. Tio kondukos nin analizi la dramon skismon, kiu rompis la normalan evoluon de la Volapükismo. Ni ankaŭ rigardos al la sinteno de Zamenhof rilate al la lingvo de Schleyer. Estas temo eble iom nova por vi, kiu devigis nin entrepreni la studon mem de la lingvo Volapük. Kion ni citas, tio ne estas ĉerpitaĵoj el priskriboj de Volapük, sed rezulto el niaj propraj legoj de volapükaj libroj kaj gazetoj.

Cl.- Se estas facile interesiĝi pri la diversaj lingvoj, kiuj estis proponitaj de la naturalista skolo pro ilia latinida aspekto, kiu ebligas al franclingvano tujan legadon, estas multe pli komplike trastudi la historion de Volapük pro la absoluta arbitreco de la vortaro imagita de Johann Schleyer.

A.- Je unua lego Volapük estas por ni tiel fremda, kiel afrika idiomo aŭ turka dialekto. Aŭdu klarigojn en Volapük, kiuj rakontas pri la fono de la Volapüka Akademio en 1887 :

Cl.- « *Kadem volapüka pefünom, jölul balsid mil jöltum jölsevel, pötü lasam valemik volapükanas in München. Cifal, Dilekel e kademals balsemäl peväloms fa lasamef ; kademals zül e Sekretel peväloms poso fa kademals it. Kademalef pesuflagom bletimo danemön kademalis balsekil nulik. »*

A.- Per tiu lego vi certe komprenis, ke la lingvo Volapük ne apartenas al la hindeŭropa familio. Tiu manko de fileco, eble pli ol ĝia artefariteco, kondukos al la kriza situacio. Kiam esperanto devas solvi gramatikan aŭ vortaran problemon, ĝi ĉiam povas rigardi ĉirkaŭ si al la parencaj lingvoj, ĉar ĝi apartenas al lingvofamilio, ĉar ĝi havas gepatrojn en la eŭropaj kulturlingvoj. Volapük estis speco de orfo sen gepatroj, kiu dependis de la vorto de kelkaj disputemuloj.

Cl.- La Superega Estro : en Volapük : **Cifal**, la Direktoro : en Volapük : **Dilekel**, kaj aro da akademianoj : **Kademalef**.

A.- La du kontraŭajn tendencojn reprezentis Johann Schleyer kaj Auguste Kerkhoff's la Superega Estro kaj la Direktoro.

Cl.- La plej granda simileco inter la lingvo de Schleyer kaj tiu de Zamenhof estas ilia aglutineco. Tio signifas, ke en ambaŭ lingvoj la vortoj malmuntiĝas en vorteroj troveblaj senŝanĝe en la vortaro.

A.- La verko, el kie ni ĉerpis la tekston, kiun ni ĵus legis, nomiĝas :

Cl.- ***Yelabuk pedipedelas***.

A.- Tiuj du vortoj malmuntiĝas laŭ 8 eroj :

Cl.- **yel-a-buk pe-diped-el-a-s**.

A.- Por legi Volapükon, kiel por legi esperanton, oni devas lerni, kiel la vortoj malmuntiĝas. Estas kiel por **ĉarmulino**. Se vi legas :

Cl.- **ĉar-mul-in-o** vi ricevas tute alian impreson, ol se vi legas **ĉarm-ul-in-o**.

Historio pri la internacia lingvo, 2-a parto
Aspekto de Volapük
Claude Gacond, 232-a radioprelego, 1968.03.20 & 23

A.- Kiel por esperanto oni ne trovas la vortojn laŭ ilia alfabeto, sed laŭ la ordo de la ĉefaj elementoj. En esperanto por kompreni **ekplori**, oni devas unue serĉi la signifon de **plori**. La studo de la afiksaro ebligas tiam malkovri la signifon de la tuta vorto **ek-plor-i**. Same estas por Volapük.

Cl.- Por Zamenhof la aglutineco estas unu el la kondiĉoj, kiujn internacia lingvo devas nepre plenumi. Aglutineco parte klarigas la sukceson de Volapük, kiel ĝi klarigas la sukceson de nia lingvo. Aglutineco donas vortfaradan aŭtonomecon al la lingvo, ĝi kondukas al reguleco, al logika konstruo; ĝi estas speco de mekanismo, kiu anstataŭas la refleksojn ekzistantajn en la patra lingvo.

A.- Ni revenu al niaj 8 vort-eroj **yel-a-buk pe-diped-el-a-s** kaj provu ilin traduki per esperantaj vortoj. Tiel vi iom malkovros la mekanismon de la volapüka vortfarado:

Cl.- **yel** signifas **jaro**; **a** estas liga vokalo en kunmetita vorto, **buk** signifas **libro**. Do **yelabuk** povas tradukiĝi per **jarlibro**. La elemento **pe** estas pasiva prefikso iom simila al nia participa sufikso **it**, **diped** estas radiko, kiu signifas **diplomo**; **el** estas sufikso iom simila al nia **ul**, kiu estas uzata por formi nomojn pri homoj; **a** havas nomkomplementan funkcion analogan al nia adjektiva marko **a**; **s** estas la marko de la pluralo. Se mi tradukas elementon post elemento mi obtenas por **pe-diped-el-a-s**: **it-diplom-ul-a-j**. Vi konstatas, ke la logiko de Volapük ne estas la logiko de esperanto. Tio estas interesa instruo. Logiko en lingvo estas speco de kutimiĝo al gramatikaj, vortfaraj kaj stilaj reguloj. Jen la bona traduko: **de la diplomitoj**. **Yelabuk pedipedelas** do signifas **Jarlibro de la diplomitoj**.

A.- En Volapük ni havas du vortojn kun ok elementoj.

Cl.- En esperanto ni havas kvar vortojn kun 9 elementoj: **jar-libr-o de la diplom-it-o-j**.

A.- Oni fakte konas esperanton, kiam oni kapablas facile malkovri tiujn elementojn. Same estas por Volapük. Do, lerni Volapükon, kiel lerni esperanton, estas akiri precizan ideon pri ĝia regula kaj tre simpla gramatiko kaj parkeri la signifon kaj rolon de afisoj kaj prefiksoj. Helpe de vortaro oni tiam povas deĉifri iun ajn tekston.

Cl.- Malkovrante tion, post ricevo de volapüka varbilo, multaj homoj entuziasmiĝis. Dum ili estis dediĉintaj jarojn por la studo de fremdaj lingvoj, kiuj restis fremdaj al ili, kelkaj horoj estis necesaj al ili, por ke tiu Volapük fariĝu speco de konato, kiu liveras siajn sekretojn. **Vol-a-pük** kiel **yel-a-buk** estas kunmetita vorto. **Vol** signifas **mond**; **a** kiel ni jam vidis estas liga vokalo; **pük** signifas **lingvo**, **parolo**. **Volapük** do signifas **mondolingvo** aŭ **mondoparolo**.

A.- Volapük iel estis speco de esperanto, en kiu la afiksaro kaj radikaro estis absolute arbitra. Oni rimarkas, ke Schleyer inspiriĝis de la eŭropaj lingvoj, sed ke li sin permesis transformi ĝis absurdeco radikojn universale konatajn.

Cl.- En **diped** vi rimarkas transformiĝon de la radiko **diplom**, en **buk** oni retrovas la anglan **book**, en **vol** la anglan **word**, en **pük** la anglan **speak**.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 3-a parto
Konstruo de Volapük
Claude Gacond, 233-a radioprelego, 1968.03.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Ni daŭrigas nian rapidan prezenton de la lingvo Volapük. Ni jam vidis, ke Volapük, simile al esperanto, havas aglutinan karakteron. En ambaŭ lingvoj la vortoj malmuntiĝas en vorteroj troveblaj en la vortaro.

Cl.- Sed dum la radikaro kaj afiksaro de esperanto estas planado el formoj dise ekzistantaj en la hind-eŭropaj aŭ semidaj lingvoj, la vortaro de Volapük estas arbitre elpensita.

A.- Ambaŭ lingvoj emas al absoluta reguleco. Ilia afiksaro ebligas kvazaŭ mekanike konstrui vortojn.

Cl.- Tio, ni bone konsciis, estas fremda al la eŭropa lingvosento kaj pro tio konsiderata de multaj lingvistoj kiel nenatura. Tipas la esperanta sufikso **in**, kiu havas ekvivalenton en Volapük en la prefikso **of**. El ajna **hom-** aŭ **best-nomo**, tiu prefikso ebligas konstrui la **in-** signifajn formojn : **blod** : frato, **of-blod** : fratino ; **nef** : nevo, **of-nef** : nevino ; **nök** : onklo, **of-nök** : onklino ; **tidel** : instruisto, **of-tidel** : instruistino ; **lein** : leono, **of-lein** : leonino.

A.- Dum la signifoj kaj roloj de la esperantaj afiksoj estas precize difinitaj, la volapükaj afiksoj ŝajnas esti heredaĵo de la provoj konstrui filozofiajn lingvojn, en kiuj la vortoj estus algebre konstrueblaj. Pro tio Volapük posedas afiksojn, kies sola rolo estas marki iun idean similecon.

Cl.- **Op** estas sufikso por la **kontinentoj** : **Yukop** : Eŭropo ; **Silop** : Azio ; **Melop** : Ameriko ; **Fikop** : Afriko ; **Talop** : Aŭstralio. **Üd** estas sufikso por la **ĉefpunktoj** : **noliüd** : nordo ; **suliüd** : sudo ; **vesiüd** : okcidento ; **lefiüd** : oriento. **Än** estas sufikso por la **landoj** iom simile al niaj **ujo** aŭ **io**. **Polän** : Polujo ; **Deütän** : Germanujo ; **Flentän** : Francujo ; **Jveizän** : Svisujo ; **fat** : patro, **fatän** : patrujo ; **fim** : firmeco, **fimän** : firma tero. Tiuj sufiksoj ofte apartenas al la radiko mem. **Dän** estas Danujo.

A.- La granda diferenco inter esperanto kaj Volapük troviĝas en tio, ke en esperanto la vortformado provas esti logika, dum en Volapük ĝi baziĝas sur principo de analogio. Konante la signifon de la sufikso **ej** en esperanto estas facile malkovri la signifojn de preĝejo, viandejo, presejo, kafejo, frenezulejo.

Cl.- En Volapük tio ne estas. **Öp** estas sufikso, kiu respondas al nia **ej**. **Loegön** signifante observi, oni komprenas, ke **loegöp** signifas observejo. Same estas por **fop** : frenezulo, **fopöp** : frenezulejo ; **kaf** : kafo, **kaföp** : kafejo. Sed **göt** signifante intesto, oni ne komprenas la signifon de **götöp**. Serĉante en la vortaro oni malkovras, ke por adepto de Schleyer **intestejo** signifis **ventro**. Tiam oni estas tentata sin demandi kial **stomäg**, **stomako** ankaŭ ne povus doni **stomägöp** : **stomakejo** kun la signifo **ventro**. La sufikso mem ne solvas tiun demandon.

A.- Do ia simileco povas ekzisti inter la uzo de afiksoj en ambaŭ lingvoj. Sed tiu simileco ne estas profunda. Zamenhof provis submeti sian lingvon al kiel eble plej logika konstruo, kaj en tio troviĝas la forto mem de esperanto. Schleyer provis ŝpari radikojn. Pro tio li sin permesis neatenditajn pekojn kontraŭ plej elementa logiko. En tio troviĝas la malforto de Volapük. En esperanto la mallogikaĵojn anstataŭas iom post iom pli raciaj formoj pro interna logikema forto propra al la lingvo. En Volapük oni ne sentas tiun forton pro la arbitreco de la tuta sistemo.

Cl.- Schleyer imagis sufikson **af** por la nomoj de la bestoj. Kaj jen ekzemple lia arbitra biologia nomenklaturado : **nim** signifante **animalo**, li formas **nimaf**, kiu fakte estas pleonasmo. Al tiu kunmetaĵo li arbitre donas la signifon **mamulo**, dum **mamo** estas dirata **dög** kaj

Historio pri la internacia lingvo, 3-a parto
Konstruo de Volapük
Claude Gacond, 233-a radioprelego, 1968.03.27 & 30

mamulo povus esti dirata *dögaf*. Povas esti, ke teologiaj antaŭjuĝoj tiurilate ludis ian rolon. Studante la vortformadon ĉe Schleyer oni rimarkas, ke *dög* : **mamo** estas inspirita de *dog* : **hundo** ! Sed ni revenu al la sufikso *af*. *Flitön* signifas **flugi**, kion signifos *flitaf* ? **flugbesto**. Vi pensas eble al **birdo**. Prenu la vortaron, kaj vi mire malkovros, ke *flitaf* estas tradukata per **muŝo**. Birdo estas *böd*. El *spul* : **tuko** Schleyer imagis *spulaf* : **araneo**. El *jal* : **karapaco**, li ne formis **testudo**, ĉar *jalaf* ricevis la signifon **krustaco**.

A.- Tiu arbitro ruinigis la lingvon de Schleyer. La volapükistoj admiris en sia lingvo la simplon de la gramatiko, la fekundecon de multaj afiksoj. Tamen ili ne povis sin submeti al la arbitraj konstruoj imagitaj de la **Superega Estro**, en volapük de la *Cifal* [ĝifal]. Sed kiam ili provis pli logikajn formojn, tiam la tuta konstruaĵo disruiniĝis.

Cl.- La teologiaj antaŭjuĝoj de la katolika pastro reaperas en diversaj vortelektaj. Ni menciu la strangan prefikson *lu* kun malŝata, malestima signifo. *God* : **dio**, *lugod* : **idolo** ; *begön* : **preĝi**, *lubegön* : **almozi** estas derivaĵoj, kiuj odoras je *kristana misiisma superemo* ! Ni notu aliajn uzojn de tiu stranga prefikso *lu* : *bien* : **abelo**, *lubien* : **vespo** ; *bod* : **pano**, *lubod* : **ŝimo** ; *bov* : **plado**, *lubov* : **telero** ; *cöd* : **justeco**, *lucöd* : **antaŭjuĝo** ; *dlinön* : **trinki**, *ludlinön* : **drinki** ; *fel* : **kamparo**, *lufel* : **erikejo** ; *fidön* : **manĝi**, *lufidön* : **vori** ; *jeval* : **ĉevalo**, *lujeval* : **ĉevalaĉo**.

A.- Konklude ni diru, ke Volapük estas provo plej multe etigi la stokon da lernendaj radikoj helpe de plej neatenditaj afiksoj. Kelkaj el ili respondas al lingva neceso : tial ili paralelas kun la esperantaj afiksoj.

Cl.- Al nia **ar** korespondas *em* : **bled** : **folio**, *bledem* : **foliaro** ; *böd* : **birdo**, *bödem*, kiu devus signifi **birdaro** fakte signifas **kortobirdaro**. Al nia **re** respondas *ge* : **givön** : **doni**, *gegivön* : **redoni** ; *kömön* : **veni**, *gekömön* : **reveni** ; sed jen nelogikaĵo : **pükön** : **paroli**, *gepükön* : **respondi**.

A.- Sed lingvo ne estas nur vortaro. Volapük estas pli ol tiuj vortoj, kiujn ni hodiaŭ ekzamenis. Ĝi estas la rezulto de gramatiko ege preciza kaj rimedŝpara. Pri tiu aspekto de la lingvo de Johann-Martin Schleyer ni raportos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 4-a parto
Gramatiko de Volapük, arbitro kondukas al krizo
Claude Gacond, 234-a radioprelego, 1968.04.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian rapidan prezenton de la lingvo Volapük. Ni jam vidis, ke Volapük, simile al esperanto, havas aglutinan karakteron. En ambaŭ lingvoj la vortoj malmuntiĝas en vorteroj troveblaj en la vortaro. Sed en la lingvo de Johann-Martin Schleyer helpe de tiuj vorteroj la vortformado ne estas tre logika. Ĝi ofte estas bazita sur analogio aŭ eĉ estas tute arbitra.

A.- La volapüka gramatiko estas tre postulema. Ĉar ĝi uzas vokalojn por prefikse indiki la verbajn tempojn kaj por sufikse indiki la gramatikajn funkciojn, ĝi trudas al la radikoj teruran kripligon : vokalo neniam rajtas troviĝi je la komenco aŭ fino de radiko.

Cl.- Jen kiel dekliniĝas volapükaj radikoj : nominativo : **dom** : la domo; genitivo : **doma** : de la domo aŭ doma ; dativo : **dome** : al la domo ; akuzativo : **domi** : la domon. La marko de la pluralo estas la litero **s**. Do ni obtenas : **doms** : la domoj, **domas** : de la domoj aŭ domaj, **domes** : al la domoj, **domis** : la domojn. En Volapük artikolo ne ekzistis.

A.- La indikoj de la gramatikaj funkcioj ne alportis liberon en la vortordo. Strikta regulo decidis, ke la determinato devas sekvi la determinanton.

Cl.- Tio signifas, ke en Volapük oni ne povis diri : doma besto, tri domoj ; oni devis diri : besto doma : **nim doma**, domoj tri : **doms kil**.

A.- En Volapük ĉiuj vortoj ricevas striktan lokon en la propozicio. La subjekto devige estas antaŭ la verbo, la akuzativo devige post la verbo. Pro tio la stilo volapüka estas terure monotona kompare al la stilo esperanta.

Cl.- La radikoj, kiuj ne rajtas posedi vokalon je la komenco aŭ fino devige ricevas substantivan signifon. Do **gud** ne povas signifi **bona**, sed **boneco**, la **bono**. La finiĝo **ik** kondukas al la adjektivo : **gudik** : bona ; **domik** : doma ; **blod** : frato, **blodik** : frata. La adverbo formiĝas per **o** post la adjektiva finiĝo **ik** : **gudiko** : bone, **blodiko** : frate, aŭ per **o** rekte post la radiko : **del** : tago, **delik** : taga, **delo** : tage.

A.- La prefiksaj vokaloj, kiuj indikas la verbajn tempojn, ne estas nur uzataj por la konjugacio. Ili ankaŭ ebligas formi tempajn adverbojn.

Cl.- Tiuj tempaj prefiksoj estas la vokaloj en alfabeto ordo : **a, ä, e, i, o, u**.

A.- Tio estas iom kiel por la **as, is, os, us** de esperanto.

Cl.- Se ni prenas **delo**, kiu signifas **tage**, ni obtenas la adverbojn **adelo** : hodiaŭ, **üdelo** : hieraŭ, **edelo** : antaŭ-hieraŭ, **odelo** : morgaŭ, **udelo** : post-morgaŭ.

A.- La volapükistoj entuziasmiĝis por tiu sistemo kaj ĝin prezentis dum la propagandaj kampanjoj. En esperanto ĝi povus esti tradukita per **as-tage, is-tage, os-tage**. La volapükistoj konstatis, ke ĉiuj tempaj adverboj facile eniris la sistemon.

Cl.- **Ovigo** : **os-semajne, ämulo** : **is-monate, ayelo** : **as-jare**, kaj tiel plu.

A.- Tiuj tempaj prefiksoj kondukis nin al la volapüka konjugacio. La tempoj do estas indikataj per vokaloj en la alfabeto ordo.

Cl.- Kaj la personoj estas indikataj per sufiksaj pronomoj. **Ob** : mi, **ol** : ci, **of** : ŝi, **om** : li, **on** : oni. Por la pluralo oni aldonas la pluralan markon **s**. **Obs** : ni, **ols** : vi, **ofs** : ili por la virinoj, **oms** : ili por la viroj kaj objektoj.

A.- Tiu reguleco, tiu ŝparo de rimedoj, tiu logiko entuziasmigis tiujn homojn, kiuj penis lerni la verbojn en la naciaj kaj klasikaj lingvoj. Ni konjugaciu la verbon fini !

Historio pri la internacia lingvo, 4-a parto
Gramatiko de Volapük, arbitro kondukas al krizo
Claude Gacond, 234-a radioprelego, 1968.04.03 & 06

Cl.- Fini en Volapük estas *finön*. Ni forprenas la infinitivan markon *ön*, kaj komenciĝas la melodio : *afinob*, aŭ pli simple *finob*, *finol*, *finof*, *finom*, *finon*, *finobs*, *finols*, *finofs*, *finoms*.

A.- Kaj ni povas rekomenci tiun mekanismon kun ĉiu tempa vokalo.

Cl.- *afinob* : mi finas, *äfinob* : mi finis, *efinob* : mi estas fininta, *ifinob* : mi estis fininta, *ofinob* : mi finos, *ufinob* : mi estos fininta.

A.- Dum deko da jaroj, inter 1880 kaj 1890, miloj da homoj entuziasmiĝis por tiu sistemo. Sed baldaŭ tiu konjugacio montriĝis malpli mirakla, ol oni kredis. Unue ĝi devige kripligas la radikojn, ĉar ĝi ne konvenis al radikoj kun komencaj kaj finaj vokaloj. Kaj kial tiu alfabeto ordo en la vokalaj prefiksoj ? Kial tiuj *obs*, *ols*, *ofs*, *oms* ?

Cl.- Oni rimarkis, ke tiuj konjugaciaj afiksoj estis absolute arbitre elektitaj. Kial ne *pam*, *pem*, *pim*, *pom*, *pum* por la pronomoj. Tio estus same mekanika kaj ne malpli eŭfonia kaj evitus la vokalan kripligon de la radikoj : *finpam*, *finpem*, *finpim*, *finpom*, *finpum*.

A.- Lingvo kiel Volapük ne povis rezisti al tiaj demandoj. Subite la arbitreco de la tuta lingvo aperis en plena lumo. Kial la pronomoj troviĝas je la fino kaj la tempaj markoj je la komenco ? La kontraŭo same aŭ eĉ pli bone funkcias.

Cl.- *Ob fina*, *ol fina*, *of fina*, *om fina*, *on fina*.

A.- Tiuj demandoj venigis aliajn demandojn. En lingvo, kie ĉio estas arbitre elpensita, kiel krei novajn radikojn ? Kiu rajtas tion fari ? Ĉu la kreinto de la lingvo, ĉu la Direktoro de la Akademio, ĉu la akademiano, ĉu la verkistoj ?

Cl.- En la jarlibro de la diplomitoj : *Yelabuk pedipedelas* tiuj demandoj okupas plurajn paĝojn. Ili restos senrespondaj, ĉar dum la tria Universala Kongreso okazinta en Parizo en 1889 skismo detruos tiun artefaritaĵon.

A.- Naŭzo por tiu lingvo subite anstataŭas la entuziasmon por la verko de Schleyer.

Cl.- La homoj, kiuj tiom penis por parkeri la signifon de tiuj kripligitaj radikoj, eĉ ne plu povas toleri la ideon mem pri lingvo internacia. Ili provis lerni, ke en la mondlingvo *nul* devas signifi *noveco*, *kanal* : artisto, *klub* : asocio, *kod* : motivo. Pro tio ili malŝatos kun agresemo la esperantistojn malgraŭ, ke en ilia lingvo *nul*, *kanal*, *klub*, *kod* kaj preskaŭ ĉiuj ceteraj radikoj estas plene naturaj.

A.- Ili eĉ ne volos rigardi al esperanto. Homoj naŭzigitaj malofte kapablas resti objektivaj. Naŭzo estas subjektiva reago.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 5-a parto
Influo de Volapük super esperanto
Claude Gacond, 235-a radioprelego, 1968.04.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Esperanto estas lingvo proponita ok jarojn post Volapük. Pro tio oni povas fari al si demandon : « *Ĉu Zamenhof estis influita de Schleyer ?* »

Cl.- Ni havas la privilegion posedi dokumentojn pri du praesperantaj projektoj. Temas pri tekstoj verkitaj de Zamenhof en la jaroj 1878 kaj 1881, do por la unua je unu jaro antaŭ la apero de Volapük. Komparante tiujn dialektojn kun la Lingvo Internacia de 1887 ni povas havi ideon pri la evoluado de la prilingvaj zorgoj de Zamenhof.

A.- Gaston Waringhien atentege ekzamenis tiujn dokumentojn en sia monumenta verko *Lingvo kaj Vivo*. Li konstatis iun influon de Volapük en la dialekto, kiu datiĝas de 1881 : du jarojn post la publikigo de la lingvo de Schleyer. Tiu influo montriĝas per tendenco sisteme unusilabigi la fundamentan vortaron laŭ absolute arbitraj kriterioj.

Cl.- Jen ekzemple kelkaj tipaj kripligoj influataj de la volapüka spirito : en la dialekto de 1881 trankvila estas **kvila**, amiko : **miko**, sinagogo : **sengo**, infano : **fano**, facila : **fala**, eleganta : **luga**, demandi : **mandi**, aromo : **romo**, kolekti : **keli**, ekstrema : **trema**, respondi : **pondi**.

A.- Gaston Waringhien konkludas : « *Nian detalan analizon ni povas konkludi per [la konstato], ke en tiu dialekto de 1881 la juna Zamenhof profunde ricevis la influon de la en 1879 aperinta Volapük, kies ĉefa trajto estas ĝuste la sistema unusilabigo de la nacilingvaj radikoj. Sed li sciis tamen eviti la ekstremajn deformojn, kiuj ridindigis la lingvon de Schleyer : **nim** por latina **animal**, **plim** por franca **compliment**, **nol** por angla **knowledge**, aŭ eĉ **sül** por franca **ciel** ; kaj precipe li rezervis tiun pritraktadon al la komunaj vortoj, sed lasis sensanĝe la vere internaciajn. »*

A.- Kion ni ne forgesu, estas ke tiuj volapükaj deformoj ridindigis la lingvon de Schleyer, nur kiam tiu lingvo ekkrisis, do du jarojn post la apero de esperanto. Tre rapide Zamenhof rezignis pri tiuj arbitraj mallongigoj de radikoj. Tamen en sia projekto de 1887 li konservis kelkajn el ili, kiam laŭ li ili alportis lingvan profiton : pro tio ni diras **individuo** pro la latina **individuitas** : individueco, sed anstataŭ **spirituo** ni kontentiĝas diri **spirito** aŭ **sprita**, kio malfacile akordiĝas kun **spiritualismo**. Estas multaj tiaj detaletoj, kiuj alportas al esperanto apartan karakteron de vivanta memstara lingvo.

A.- Studante Volapükon ni rimarkis alian influon, kiu verŝajne lasis tre grandan spuron en esperanto. La kvar versoj, kiujn ni posedas de la dialekto de 1878, ne indikas, ĉu Zamenhof tiam jam provis konstrui tabelon permesanta formi laŭ metodo tipa al Volapük vortojn kiel **io**, **tio**, **kio**, **nenio**, **ĉio**.

Cl.- Analizante la dialekton influatan de Volapük Gaston Waringhien rimarkis la provon ĉe Zamenhof tabeligi la vortojn, kiujn ni hodiaŭ nomas korelativojn. En mia ekstudo de Volapük mi estis frapita de la simileco ekzistanta inter la esperanta korelativa tabelo kaj multaj volapükaj tabeloj. Ni jam menciis la tempajn adverbojn : **adelo** : hodiaŭ ; **üdelo** : hieraŭ ; **edelo** : antaŭ-hieraŭ ; **odelo** : morgaŭ ; **udelo** : post-morgaŭ ; **avigo** : tiun ĉi semajnon ; **ävigo** : pasintan semajnon ; **evigo** : antaŭ-pasintan semajnon ; **ovigo** : venontan semajnon ; **uvigo** : post-venontan semajnon ; **ayelo** : tiun ĉi jaron ; **äyelo** : pasintan jaron ; **ejelo** : antaŭ-pasintan jaron ; **ojelo** : venontan jaron ; **uyelo** : post-venontan jaron.

A.- Ni hodiaŭ prezentos al vi alian volapükkan serion. Kaj ni lasos vin decidi, ĉu ĝi iel influis Zamenhof aŭ ne !

Historio pri la internacia lingvo, 5-a parto
Influo de Volapük super esperanto
Claude Gacond, 235-a radioprelego, 1968.04.10 & 13

Cl.- En la volapüka vortaro ni malkovras la vorton **ki**, kiu estas tiel difinita : **demanda prefikso**. Ni rigardu, kiujn demandajn vortojn formas tiu prefikso. En Volapük la finiĝo de la adjektivoj estas **ik**. Ekvivalento en esperanto : **a**. Uzante la eŭfonian literon **m** Volapük formas la demandan vorton **kimik**, al kiu oni respondas per adjektivo. Esperanta ekvivalento : **kia** al kiu oni ankaŭ respondas per adjektivoj.

A.- En Volapük la finiĝo de la adverboj estas **o**. **Kimiko** atendas adverbos kiel respondon. Esperanta ekvivalento: **kiel** al kiu oni respondas per adverboj.

A.- Volapük havas sufikson por la lokoj, kiu similas al nia **ej**. Tiu sufikso **öp** ebligas konstrui demandan vorton por la lokoj : **kiöp**. Esperanta ekvivalento devus esti **kiej**. Pro la mova akuzativo Zamenhof devis ŝanĝi tiun **kiej** en **kie**. Pro tio li devis transformi **kie** en **kiel**.

Cl.- Volapük havas sufikson por la tempo, kiun esperanto ne konas. Tiu sufikso **üp** permesis formi demandan vorton, kiu atendas tempan respondon : **kiüp**. Esperanta ekvivalento **kian**, kiu baldaŭ fariĝis nia **kiam**.

A.- Kaj por la kaŭzo. En Volapük kaŭzo estas **kod**. Kaŭzi aŭ okazi estis **kodön**. Tiu radikalo permesis formi demandan vorton por la kaŭzoj : **kikod**. Esperanta ekvivalento : **kial**.

Cl.- **Kiom** tradukiĝas en Volapük per **kimna**. Jen nova ki-vorto formita kun **na**, nombra sufikso, kiun esperanto ne posedas.

A.- En Volapük oni distingis demandojn por la viraj, virinaj kaj neŭtraj pronomoj.

Cl.- En la konjugacio ni jam konatiĝis kun **om**, la pronomo li kaj **of** la pronomo ŝi. **Kiom** signifas kiu por viroj, **kiof** signifas kiu por inoj. La neŭtra demando estas **kios**. Esperanta ekvivalento **kio**.

A.- La paralelismo fariĝas ankoraŭ pli frapa, kiam oni rimarkas, ke en Volapük la demonstraj vortoj formiĝas per la prefikso **at** kaj **et**. Esperanta ekvivalento **ti**.

Cl.- Al la volapükaj **atos** kaj **etos** respondas la esperantaj **ĉi tio** kaj **tio**.

A.- La negacio formiĝas en Volapük per **ne**.

Cl.- Al la volapüka **nos** korespondas la esperanta **nenio**.

A.- La granda diferenco inter Volapük kaj esperanto estas, ke en Volapük tiuj afiksoj ne nur estas uzataj por la formado de tiuj korelativoj.

Cl.- En la lingvo de Schleyer al la demando **kiüp** oni povis respondi **cilüp**. Litera traduko : **Kiam ? Infanam**. Infanam signifus en la tempo de la infaneco. Kio estas interesa en esperanto, estas la tendenco al ricigo de tiu artefaritaĵo. Multaj esperantistoj kredas, ke la adjektivo **alia** apartenas al la korelativoj. Tial ili diras **aliam**, **alies**, **aliom** kaj tendencas diri **alie** por **aliloke** kaj **aliel** por **alie**.

A.- Tio montras, ke artefaritaĵo ekvivas en lingvo, kiu vivas.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 6-a parto
Yelabuk pedipedelas
Claude Gacond, 236-a radioprelego, 1968.04.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia studo pri la lingvo Volapük ni jam menciis la historian gravecon de la broŝuro **Yelabuk pedipedelas** : *Jarlibro de la diplomitoj*.

A.- Tiu jarlibro havas historian valoregon, ĉar ĝi kvazaŭ radiografie priskribas la farton de la volapükismo ĵus kelkajn monatojn antaŭ ĝia ekfalo.

Cl.- Ni estas en la jaro 1889. La pariza kongreso ne ankoraŭ okazis.

A.- Sciigojn pri tri ĉefaj punktoj donas tiu jarlibro.

Cl.- Unue ĝi listigas la lingvajn demandojn solvendajn far la Volapüka Akademio. Pro formiĝo de du tendencoj kontraŭaj personigitaj de la **Cifal** (Ĉefo) kaj **Dilekel** (Direktoro) tiu prilingva debato kondukos al mortiga skismo. Ĉirkaŭ la **Cifal** Johann-Martin Schleyer grupiĝos la konservativuloj kaj ĉirkaŭ la **Dilekel** Auguste Kerckhoffs la reformemuloj. Estas drama situacio, kiun esperanto travivos dufoje, sed feliĉa ne mortige.

A.- La dua parto de tiu *Jarlibro de la diplomitoj* havas bibliografian karakteron. En ĝi Auguste Kerckhoffs registras ĉiujn verkojn, kiuj ekde la 17-a jarcento menciis la eblecon krei universalan artlingvon aŭ proponis tian idiomon. Tiu registrado jam mencias en tri eroj la lingvon de Zamenhof. Jen ili :

Cl.- *Dr Esperanto (Zamenhof).- Langue Internationale. Préface et manuel complet ; in-16, f. 48. Varsovie, Gebethner et Wolff, 1887. Noted.- Vobuk at pepübom poso in püks deutik, nelijik, polänik e rusänik.*

A.- Traduko de la volapüka noto : *Rimarko : tiu verko estis ankaŭ eldonita en la lingvoj germana, angla, pola kaj rusa.*

Cl.- La dua ero estas : *Dr Esperanto (Zamenhof).- Dua libro de l' lingvo internacia ; in-16, f. 50. Varsovie, Kelter, 1888. Noted.- Log. La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems, fa Leopold Einstein. Nürnberg, Stein, 1888.*

A.- Traduko de la noto: *Rimarko: vidu: La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problem [kiel plej bona solvo pri la problemo de internacia mondlingvo], de Leopold Einstein. Nürnberg, Stein, 1888.*

Cl.- La tria ero registras tiun verkon de Leopold Einstein.- *La Lingvo internacia als beste Lösung des Weltsprache-Problems; Grammatik und Wörter-Verzeichniss, nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto; in-16, f. 78. Nürnberg, Schiener, 1888.*

A.- Tiu akurateco en la registrado de la proponoj de novaj projektoj eĉ konkurencaj al Volapük pruvas la sciencan objektivecon de la laboro de Auguste Kerckhoffs. Tiu franca volapükisto estas la unua verkisto de bibliografio de la internacia lingvo. Li rikoltis dokumentojn, kiujn poste studos Louis Couturat kaj Léopold Leau en sia *Histoire de la Langue Universelle*, 1903.

Cl.- Tiu bibliografio de Kerckhoffs ankaŭ listigas la volapükan literaturon. En antaŭa elsendo ni jam ĉerpis el tiu listo, kiam ni provis doni ideon pri la dinamismo de la volapüka movado. Ni rememorigu, ke en 1888 aperis 146 volapükaĵoj. Tio signifas po du titoloj semajne.

A.- En tria parto la *Jarlibro de la diplomitoj* listigas la diplomitojn, el tio la nomo de la broŝuro.

Historio pri la internacia lingvo, 6-a parto
Yelabuk pedipedelas
Claude Gacond, 236-a radioprelego, 1968.04.17 & 20

Cl.- Diplomojn rajtis aljuĝi la **Datuval** (Inventinto de la lingvo), la franca kaj la aŭstria volapükaj asocioj : **Volapükaklubs flentik e zenodik Löstäna**.

A.- Regularo priskribas detalege la manierojn trapasigi tiujn ekzamenojn kaj difinas iliajn lingvajn nivelojn.

Cl.- Por la instruantoj la **Datuval** (Inventinto) rajtis aljuĝi diplomojn nomataj : **Tidela**, **Löpatidela** kaj **Plofeda**, kio povas tradukiĝi per : por la elementa instruado, por la supera instruado kaj por la universitata instruado. Por akiri la plej superan diplomon : **Diped Plofeda** la kandidato devis unue trapasi la diplomojn elementajn kaj superajn. Poste li devis esti instruita volapükon dum almenaŭ unu jaro. Li devis esti verkinta lingve seneraran memuaron. Li devis majstri en la parola uzo de la lingvo almenaŭ 2'000 vortradikojn. Fine li devis promesi nenion ŝanĝi en la sistemo volapüka.

A.- La franca kaj aŭstria asocioj aljuĝis diplomojn por la instruado de la lingvo kaj por la komerca koresponda uzo. Tiuj ekzamenoj okazis je difinitaj datoj en multaj urboj antaŭ kontrolantoj.

Cl.- La eldono de la **Yelabuk pedipedelas** estas pruvo, ke tiu sistemo permesis kunlaboron inter tri organizaĵoj. Dum la germana movado estis sub la estrado de la **Datuval** Schleyer, la francaj kaj aŭstraj volapükistoj estis grupigitaj en propra nacia asocio. Dank'al la personeco de la **Dilekel** Kerckhoffs ordo kaj kunlaboro regis en tiu trikapa mondo.

A.- La listo de la diplomitoj kaj de la komercistoj korespondantaj volapüke

Cl.- (en Volapük : **Lised pedipedelas e Tedamonas kels spodoms volapüko**)

A.- ludis du rolojn. Unue ĝi permesis kontroli la disvastiĝon de la lingvo : oni sciis, kiu rajtas instrui la lingvon, kiaj firmaoj havas diplomitajn korespondantojn. Due ĝi ebligis kontaktojn. En tio, tiu listo de diplomitoj estas speco de delegitaro. Per ĝi oni povis sin riski uzi la lingvon de Schleyer okaze de vojaĝo aŭ por ricevi informojn.

Cl.- Traesplorante tiun **Yelabuk pedipedelas** oni povas desegni geografian mapon de la disvastiĝo de Volapük en la komenco de la jaro 1889. Por fari sciencajn laborojn oni devus kalkuli landan koeficienton dividante la nombron de la diplomitoj per la nombro de la enloĝantoj. Sed por nia rapida studo ni kontentiĝos vice listigi la landojn laŭ ilia diplomitaro. Jen la landoj, kiuj posedis pli ol 100 diplomitojn :

A.- Unue Germanio kun 691 diplomitoj, due Francio kun 315 diplomitoj, trie Aŭstrio kun 199 diplomitoj, kvare Italio kun 129 diplomitoj kaj kvine Nederlando kun 126 diplomitoj.

Cl.- Kaj nun tiuj, kiuj posedis pli ol 50 diplomitojn :

A.- Ruslando, Usono, Belgio, Svislando, Danlando kaj Britio.

Cl.- Kiel vi konstatas, unuavice troviĝas Germanio, kie la lingvo naskiĝis. Postvenas la najbaroj de Germanio. Iom post iom sekvas ĉiuj ceteraj landoj de la tiama industria mondo.

A.- Volapük estas socia fenomeno propra al la okcidenta civilizo. Eŭropo kaj Usono sentis la bezonon pri supernacia lingvo. Sin prezentis Volapük. Estis nature entuziasmiĝi por ĝi.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 7-a parto
La volapüka akademio
Claude Gacond, 237-a radioprelego, 1968.04.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia studo pri la lingvo Volapük, antaŭ ol priskribi la tiklajn punktojn, kiujn estus devinta solvi la Volapüka Akademio, ni diros kelkajn vortojn pri tiu institucio mem.

A.- Dum la unua Volapüka Kongreso okazinta en aŭgusto 1887 en München oni rimarkis du prilingvajn tendencojn. Multaj volapükistoj sentis la bezonon reformi la lingvon por igi ĝin pli flekseblan kaj pli facile paroleblan. Sed aliaj adeptoj de Schleyer kontraŭis tiun reformismon.

Cl.- Oni tiam decidis elekti akademianojn por peti ilin respondi al la prilingvaj demandoj. Sed por eviti la venkon de unu tendenco super la alia la volapükistoj, anstataŭ sin doni unu solan gvidanton, elektis du estrojn. La konservema **Datuval** (Inventinto de la lingvo) ricevis novan pompan titolon fariĝante **Cifal** [ĝifal] : Supera Ĉefo. Li posedis veto-raĵton super la laboro kaj decidoj de la Akademio. La agema kaj reformema Auguste Kerckhoffs ricevis la funkcion de Direktoro de la Akademio : **Dilekel Kadema**.

A.- 16 akademianoj estis elektitaj. Tiu akademianaro ricevis la rajton elekti novajn membrojn. Tiel 9, poste 13 novaj akademianoj kompletigis tiun institucion.

Cl.- Por la unua fojo en la homa historio estis elektita per demokrata vojo institucio, kies rolo estis okupiĝi pri la mondlingvo. Ni ne forgesu, ke **volapük** signifas **mondlingvo**. **Kadem volapüka** signifas : **Akademio de la mondlingvo**.

A.- En la revuo *Scienca kaj senpartia volapükisto*

Cl.- (Volapüka titolo : **Volapükan nolik e nepaletik**)

A.- ni trovis informojn pri la akademianoj mem kaj pri ilia laboro. Monaton post monato en tiu gazeto la personeco de tri akademianoj estas prezentata. Ni tiel posedas la fotojn kaj kelkajn sciigojn pri la ĉefaj roluloj de la volapüka dramo. Kiuj estis tiuj homoj ? Por ke vi akiru ideon pri ili, ni tradukos kelkajn el tiuj artikoletoj.

Cl.- Kion ni bedaŭrinde ne povas fari, estas imiti la pompan volapükan stilon. En tiu lingvo ekzistas prefiksoj kaj sufiksoj kiuj, simile al nia **eg**, povis pliigi la signifon de la radiko. Aliaj havas honorigan rolon aŭ esprimas admiron. Tiu aspekto de Volapük bone respegulas la regemon de Johann-Martin Schleyer. Jen, kun provo redoni tiun bombaston, la traduko de la kvinlinia informo pri la **Datuval** kaj **Cifal** Schleyer : la majstra Inventinto kaj supera Ĉefo Schleyer :

A.- « *La majstra Inventinto de la mondlingvo naskiĝis en Oberlauda (Baden) en la jaro 1831. Tiu grandioza filologo ekverkis la gramatikon de la mondlingvo la 31-an de marto 1879. Lia tiom grava ideo baldaŭ varbis admirantojn en diversaj landoj kaj hodiaŭ, post nur dek jaroj, mondlingvanoj jam ekzistas en ĉiuj terpartoj. Ne necesas priskribi la laboran gigantecon de la tiom ŝatata majstra Inventinto, ĉar ĉiuj mondlingvanoj jam legis detalan informon pri la vivo de nia Majstrego. Ni nur povas diri : vivu la majstra Inventinto kaj lia Mondlingvo.* »

Cl.- Oni riproĉis al la esperantistoj ilian respektemon al la Majstro. Sed kiel vi konstatis per tiu traduko, la volapükistoj estis almenaŭ dekoble pli adoremaj. Kaj Zamenhof kontraŭis tiun adorem, dum Schleyer ĝin favoris.

A.- Ni traduku nun, kion tiu volapükista gazeto diris pri Auguste Kerckhoffs, la Direktoro de la Akademio.

Cl.- « *La Direktoro de la Akademio de la mondlingvo naskiĝis en Maastricht (Nederlando) la 19-an de januaro 1835. Li studis en la universitatoj de Löwen kaj de Bonn kaj fariĝis doktoro*

Historio pri la internacia lingvo, 7-a parto
La volapüka akademio
Claude Gacond, 237-a radioprelego, 1968.04.24 & 27

pri filologio, oficiro de la Franca Akademio, kavalira moŝto, oficiro de diversaj aliaj kavaliraj ordenoj. Doktoro Kerckhoffs, profesoro pri modernaj lingvoj en la plej alta akademio de Parizo, estas aŭtoro de multaj talentaj sciencaj verkoj redaktitaj en la nederlanda, germana kaj franca, tiuj verkoj koncernas ankaŭ aparte la mondlingvon. Kiel Direktoro de la Akademio de la Mondlingvo li laboras energie por la disvastigo de la mondlingvo. »

A.- Prelegante aŭ skribante pri Volapük Auguste Kerckhoffs ŝatis reliefigi siajn nobeltitolojn. En artikolo li eĉ forgesas paroli pri Schleyer profite nur al si.

Cl.- Inter ambaŭ gvidantoj de la volapüka movado ekzistis reciproka ĵaluzemo pro personaj kaŭzoj. Se oni ekzamenas la fotojn de Schleyer kaj de Kerckhoffs, oni rimarkas, ke ambaŭ viroj estas regemaj laŭ la sama maniero. Ili eĉ tre similas unu al la alia.

A.- La personeco de Kerckhoffs multilate pensigas al tiu de Louis de Beaufront. Ambaŭ viroj troviĝis en simila situacio kaj reagis sammaniere. Avidaj je titoloj kaj gvidaj funkcioj ili trovis, ĉu en la volapüka movado, ĉu en la esperanta movado, grandan laborkampon, kie ili povis centprocente valorigi siajn talentojn de pedagogo, organizanto, propagandisto, advokato kaj teoriemulo. Ili ŝatis senti la admiremon de la publiko.

Cl.- Pedantismo kronis tiun personecon per memfiero kaj netoleremo. Kiam Auguste Kerckhoffs kaj Louis de Beaufront ekperdos la gvidadon super sia movado, tiam ili provos ĝin retrovi en skisma situacio.

A.- En la politika, religia kaj profesia vivo oni ofte renkontas tiun specon da homoj, kiuj lerte dividas anstataŭ favori kunlaboron.

Cl.- Kerckhoffs loĝis en Parizo. Pro tio oni elektis alian parizanon al la funkcio de Sekretario de la Akademio : ***Sekretel Kadema***. Jen por kompletigi tiun homgalerion la portreto de Hippolyte Guigues, la Sekretario de la Mondlingva Akademio, tio, daŭre laŭ tiu volapüka revuo :

A.- Hippolyte Guigues naskiĝis la 10-an de decembro 1849 en Aix (Francio), li studis en la liceo de Marseille. Li estis nomita profesoro pri la franca lingvo kaj matematiko en 1886, profesoro pri desegnado en 1889 kaj profesoro pri stenografio en 1870. Sinjoro Guigues defendis sian landon dum la milito, kiu okazis en 1870-71. Forlasinte la armeon en 1872 li tuj iris al Parizo por studi filologion kaj literaturon. En 1885 li eldonis sian unuan verkon pri stenografio : *Méthode d'ornementation sténographique*. Sinjoro Guigues ekstudis la mondlingvon en 1886 kaj de tiu jaro instruas en Parizo tiun lingvon. Li estis nomita profesoro kaj akademiano en 1887. Lia verko ***Dö bükav*** (*Pri la tipografio*) skribita en la franca kaj en la mondlingvo estis eldonita en 1888. Sinjoro Guigues estas amiko de la sciencoj kaj de la progreso, li konsideras ĉiujn homojn kiel fratojn kaj la mondon kiel sian patrion.

Cl.- Kiel vi konstatas, tiu sekretario de la Mondlingva Akademio estas homo simpatia, kiu iris al Volapük pro idealismo homama.

A.- Lia foto prezentas lin kiel homon magran kun grandega liphararo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 8-a parto
La volapüka akademio antaŭ la lingvaj demandoj
Claude Gacond, 238-a radioprelego, 1968.05.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian priskribon pri la laboro de la Volapüka Akademio aŭ Mondlingva Akademio : **Kadem Volapüka**. Ni vidis, ke tiu institucio estis kreita en 1887 okaze de la unua Volapüka Kongreso, ke Schleyer ricevis la titolon de Supera Ĉefo : **Cifal** [ĝifal] kaj vetorajton super la decidoj de la Akademio. Du parizanoj funkciis kiel Direktoro : **Dilekel** kaj Sekretario : **Sekretel** de la Akademio : Auguste Kerckhoffs kaj Hippolyte Guigues. En la revuo **Volapükan nolik e nepaletik** (*La scienca kaj senpartia volapükisto*) ni trovis artikolojn pri tiu tri viroj.

A.- Estis necese ekvilibri la francan tendencon en tiu Akademio. Pro tio estas la aŭstro von Rylski, kiu ricevis la oficon de vic-direktoro. Jen kion ni scias pri tiu volapükisto, laŭ tiu revuo :

Cl.- « *Von Rylski naskiĝis la 8-an de oktobro 1840 en Lemberg (Galicio). Dum la unuaj jaroj de sia vivo li restadis en la kamparo, tio en la regiono Sanok (Galicio), kie lia patro posedis bienon, kaj dum unu jaro en Lemberg mem. Kiam li fariĝis 12-jara li eniris la lernejon Theresianum en Vieno, kie li studis dum 12 jaroj. Li faris tie studojn pri jurisprudenco, sed kiam li forlasis en 1864 tiun lernejon Theresianum, li ne serĉis postenon de jurkonsilisto ; li sin dediĉis al studoj pri matematiko kaj fiziko. Post kelkaj jaroj li fariĝis profesoro, unue en la gimnazio de Czernowtz, poste en la gimnazio de la tria distrikto en Vieno. Li konatiĝis kun Volapük en septembro 1885 per s-ro Obhlidal kaj publikigis lernolibron pri Volapük.* »

A.- Kion faris tiu Volapüka Akademio ?

Cl.- Dum du jaroj ĝi provis funkcii kiel vera lingva akademio. Ĝi rigardis, registris la problemojn kaj kontentiĝis nenion decidi. Sed la demandoj absolute respondendaj amasiĝis.

A.- Tiam la Direktoro Auguste Kerckhoffs decidis ekagi. Li registris ĉiujn tiujn demandojn por ilin submeti dum la sesioj de la tria Volapüka Kongreso en somero 1889 en Parizo.

Cl.- Tiu listo aperis en la **Yelabuk pedipedelas**, *Jarlibro de la diplomitoj*, verko, kiun ni jam multfoje citis.

A.- Ni iom vidu kiaj demandoj sin prezentis antaŭ la volapükistoj.

Cl.- Unue estis demandoj pri la sonoj de la lingvo. Apud la puraj vokaloj **a**, **e**, **i**, **o** kaj **u** ekzistis la vokaloj **ä**, **ö** kaj **ü**. Inter la **e** kaj la **ä** okazis senĉese konfuzoj, ne nur en la parola uzo, sed ankaŭ en la skriba uzo de la lingvo. Pro tio oni proponis reformon de la fonetiko mem de la lingvo de Schleyer.

A.- La Akademio, kiu ekzamenis tiun problemon konstatis, ke fonetika reformo signifus kompletan reformon. Ĝi do decidis nenion ŝanĝi al la volapüka sonsistemo, sed ĝi samtempe proponis, ke en novaj vortoj oni evitu la sonojn **ä**, **ö** kaj **ü**.

Cl.- Ekzistis karakterizaj finiĝoj por la radikoj. Ekzemple ĉiuj landradikoj finiĝis per la silabo **än**, ĉiuj kontinentoj per **op**, ĉiuj bestoj per **af** kaj floroj per **äf**. Sed anstataŭ diri **kataf**, kaj **dogaf** por kato kaj hundo, la volapükistoj pli simple diris **kat** kaj **dog**. La karakteriza finiĝo montriĝis nenecesa. Tiam la demando estis : « *Ĉu oni ne devus forigi tiujn karakterizajn finiĝojn ?* »

A.- Radikoj kiel **fotogaf** kaj **lotogaf** finiĝis per **af** sed ne koncernis bestojn. Ili signifis **fotografio** kaj **ortografio**. Tiom longe kiam Volapük havos karakterizajn finiĝojn, tiaj neregulaĵoj estos malagrablaj. Oni atendis respondon de la Akademio.

Historio pri la internacia lingvo, 8-a parto
La volapüka akademio antaŭ la lingvaj demandoj
Claude Gacond, 238-a radioprelego, 1968.05.01 & 04

Cl.- Pro la volapüka konjugacio la radikoj ne rajtis havi komencan kaj finan vokalon. Sed oni rimarkis, ke radiko kiel **apostel** por apostolo havis komencan vokalon. Ĉu kiel por **lotogaf** oni devus diri **lapostel**, aŭ ĉu oni povus diri **otogaf** anstataŭ **lotogaf** por ortografio ?

A.- La Akademio estis en embarasa situacio. Artefarita lingvo kondukis al nenaturaj problemoj. Volapük en 1889 similis al malsanulo, kiu vivas dank'al kuraciloj. Aro da kuracistoj - la akademianoj - provis ĉesigi la medicinan intervenon. Sed tio estus tuj signifinta mort-kondamnon. Pro tio ĝermis la ideo verki novan gramatikon, kiu observu la normojn proprajn al la eŭropaj okcidentaj lingvoj, kaj ĝin proponi anstataŭ la volapüka normo, tio, pere de la Volapüka Akademio.

Cl.- Sed nenian reformtendenco sin trudis prefere al aliaj. Kiel en esperanto la adverboj kaj prepozicioj estis nudaj radikoj. Kelkaj akademianoj tion bedaŭris kaj proponis la ĝeneraligon de la adverba finiĝo **o** por marki ĉiujn adverbojn, kaj de la finiĝo **ü** por la prepozicioj. **Si**, kiu signifis **jes** devus tiam fariĝi **sio**, kaj **in**, kiu signifis **en** fariĝi **inü**.

A.- Aliaj akademianoj bedaŭris la kripligon de la radikoj. Radikoj kiel **fotogaf**, **lotogaf** ŝajnis al ili infanaĵoj. Kial ne reveni al **fotograf**, **ortograf**. Sed sur tiu ĉi vojo al naturalismo, kie halti ? Ĉu **vol** devas reveni al la formo **vorld** kaj **pük** al **spik** ? Tiam la lingvo nomiĝus **Vorldaspik**.

Cl.- Miloj da similaj demandoj listiĝis. Oni alvenis al nenia solvo. La Direktoro Auguste Kerckhoffs ludis la rolon de mediaciinto, sed neniu volis lin aŭdi. Por la konservemuloj li personigis la detruanton de la lingvo. Schleyer uzis sian vetorajton por rifuzi ĉian reformon. Por la adeptoj de reformoj Kerckhoffs personigis tiun, kiu malhelpas veran ĝisfundan reformon.

A.- Ricevante la titolon de profesoro : **plofed**, oni devis promesi nenion ŝanĝi en la volapüka sistemo. Schleyer proklamis renegatoj la posedantojn de la profesora diplomo : **diped plofeda**, kiuj voĉdonis por reformoj. En la gazetoj oni sin reciproke insultis.

Cl.- La fideluloj al la klasika lingvo sin reorganizis. Sed biologie ili troviĝis en regresa pozicio. En la volapüka publiko oni malfavoris ilin. Johann-Martin Schleyer ekkonos pli kaj pli mizerajn jarojn. Kiam li mortos en 1912 je la aĝo de 81 jaroj, li ne estos havinta la fortojn finverki la plenan volapük-germanan vortaron.

A.- Tiun laboron daŭrigos unu el liaj plej fidelaj disciploj, kaj estas nur en 1931, ke fine aperos tiu **Wörterbuch der Weltsprache**. Ĝia aŭtoro nomiĝas Arie de Jong.

Cl.- Tiu senespera gesto estas alvoko al komprenemo. Ĝi ŝajnas diri : « *Ĉiuj interesiĝis pri la laboroj de la reformema Akademio. Tamen de ĝia laboro nenio rezultis. Ili ruinigis movadon, kiu jam estis tutmonda. Malgraŭ la malbonvolo de ĉiuj, ni restis fidelaj al tiu unua tutmonda civilizo.* »

A.- Eble foje oni rememoros pri ili.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-

Historio pri la internacia lingvo, 9-a parto
Zamenhof kaj Schleyer
Claude Gacond, 239-a radioprelego, 1968.05.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni dediĉis nian atenton al la volapüka movado. Por konkludi tiun studon ni ekzamenos la sintenon de Zamenhof rilate al la lingvo de Schleyer.

A.- En la gazeto *La Esperantisto* Zamenhof publikigis serion da artikoloj titolitaj *Esperanto kaj Volapük*. Tiu eseo havis propagandan karakteron, pro tio ĝi estis dulingve redaktita en esperanto kaj en la germana.

Cl.- En tiu longega kaj ne ĉiam konvinkiga verko oni trovas paragrafojn, kiuj estas ege valoraj por la historio mem de nia lingvo. Zamenhof ne ŝatis paroli pri si mem, tial la aŭtobiografiaj tekstoj ege mankas al ni. Pro tio ni citos eron, kiu havas resonon, kiun oni neofte trovas en la skriboj zamenhofaj :

A.-« *Kiam mi antaŭ 13 jaroj komencis mian laboron, tiam Volapük ankoraŭ ne estis en la mondo. La laboro estis tre malfacila, kaj nur tiuj, kiuj mem provis komenci similan laboron, komprenos, kiom da pacienco kaj zorgoj ĝi postulis. Kiam la plej granda parto de mia laboro estis jam finita, tiam sur la scenon venis Volapük. Kaj en la unua minuto mi estis ĝoja, kiam mi ĝin aŭdis. Vi estas libera, mi diris al mi mem : via amata songo efektiviĝis, vi povas nun komenci uzi la vivon! Sed kiam mi pli proksime ekkonis la Volapük'on, mi baldaŭ vidis, ke ekster la **nomo** sen ia fundo* kaj ekster laŭdaj reklamoj ĝi nenion en si enhavas, - kaj mi denove reiris al mia laboro. »*

Cl.- En aŭgusto 1890 estis subite interrompita tiu artikolaro pri *Esperanto kaj Volapük*. Poŝtkarto hazarde konservita kaj rikoltita de Johann Dietterle por publikigo en la *Originala Verkaro* de Zamenhof donas la sekreton de tiu halto.

A.- « *Al sinjoro W. Trompeter.- La artikolo **Esperanto kaj Volapük** ne estos finita, ĉar nun la tempo multe ŝanĝiĝis kaj la batalo kontraŭ Volapük jam ne estas bezona ; nun estas pli utile ne fari plu komparojn. [...]* »

Cl.- Zamenhof revenos al la temo Volapük en 1905 dum la unua Universala Kongreso en Bulonjo ĉe Maro. Jen ero el lia parolado :

A.- « *En la unua kongreso de la esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la ĝismunaj batalantoj de nia afero. Sed antaŭ ol mi parolos pri la batalantoj speciale esperantistaj, mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la esperantistoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas.*

Cl.- *Mi parolas pri la tre estiminda sinjoro Johann-Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük. La lingva formo, por kiu laboris tiu respektata maljunulo, montriĝis ne praktika ; la vojo, kiun li elektis, montriĝis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala formo de la ideo, por kiu ni batalas.*

A.- *Sed ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro Schleyer estis tre grandaj.*

Cl.- *Kun granda fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj ; dum multaj personoj donadis nur nudajn projektojn, li estis la unua, kiu havis sufiĉe da pacienco, por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne praktika.*

Historio pri la internacia lingvo, 9-a parto
Zamenhof kaj Schleyer
Claude Gacond, 239-a radioprelego, 1968.05.08 & 11

A.- *Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo.*

Cl.- *Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksu ne laŭ sukceso, sed laŭ liaj** volo kaj laboro.*

A.- *Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon – tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de ia alia lingvo – la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos.*

Cl.- *Mi esperas, ke mi esprimos la opinion de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros : « ni esprimas nian koran dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia. »*

A.- Ni komplete citis tiun parton de la parolado de Zamenhof por montri la ŝanĝon de sinteno inter la artikolaro, kiu akre kritikis ĉion en Volapük kaj en la faroj de Schleyer, kaj tiu reĝustigo. Oni povus vidi nur ŝanĝon de bataltaktiko. Ni pensas, ke temas pri io pli profunda. Kiam Zamenhof polemikis kontraŭ la volapükistoj, tiam tiu movado estis ankoraŭ potenca. Tuj kiam ĝi ekkrisis, Zamenhof ĉesis ataki. Tiam li estus povinta profiti pri la situacio. Sed tian geston li sin rifuzis. Nur objektive Volapük estis danĝera. Objektive ĝi ekruiĝis. Oni lasu la faktojn mem agi. Plua atakado estus subjektiva reago kontraŭ malamiko. Sed la esperantistaro ne reagis tiel. La venontan semajnon ni legos al vi erojn el artikoloj aperintaj en esperanta revuo. Zamenhof tiam sentis la bezonon rehonorigi la personecon de Schleyer antaŭ la esperantistaro, por ke la atakoj kontraŭ tiu maljunulo ekĉesu.

Cl.- En du aliaj kongresaj paroladoj Zamenhof reparolis pri Volapük kaj Schleyer. Dum la kvara Universala Kongreso okazinta en 1908 en Dresdeno li rememorigis, ke Germanio estas la lulilo de la ideo de lingvo internacia, dank'al la neforgesebla granda merito de la pastro Johann-Martin Schleyer.

A.- Okaze de sia parolado antaŭ la sepa Universala Kongreso en Antvepeno Zamenhof proponis, ke oni telegrafe gratulu la prelaton Johann-Martin Schleyer, kiu antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo.

Cl.- Zamenhof bone disigis la homon de la verko. Pri la lingvo li diris :

A.- *« Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare ; ĝi pereis per si mem en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tre malforta, por iun venki ; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkiutiĝi... Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis : **absoluta manko de natura evoluipovo.** »*

Cl.- Kaj Zamenhof aldonis konklude :

A.- *“Tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo. »*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

(* en la originala teksto erare *fondo*.)

(** en la originalo *lia volokaj laboro*.)

Historio pri la internacia lingvo, 10-a parto
La esperantistoj kaj Schleyer kaj Leterujo : la respondo de M. C. Butler
Claude Gacond, 240-a radioprelego, 1968.05.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni vidis, kiel Zamenhof provis rehonorigi la personecon de Schleyer antaŭ la esperantistaro.

A.- « *Ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro Schleyer estis tre grandaj.* »

Cl.- Per tiuj diroj Zamenhof provis ĉesigi agadojn, kiujn li malŝatis. Kiam en regiono la volapŭka lingvo ĉesis esti praktikata profite al esperanto, tiam esperantistoj sentis la bezonon festi la eventon. Kaj tion farante ili ofte ne forgesis sendi malafablajn leterojn al la prelato Schleyer.

A.- Alifoje ili kaŝis sian malafablecon malantaŭ pli civilizitaj moroj. Dum grupa kunveno, kie oni manĝis volapŭkaĵojn, tio signifas : mokis pri tiu ĵargono, oni decidis publike marki la venkon de esperanto super Volapŭk. Tre afable oni redaktis oficialan leteron oferante al Schleyer gravan honorigon. Kaj oni atendis senpacience la respondon.

Cl.- Ĉiukaze oni gajnis. Imagu, ke Schleyer estus akceptinta la honorigon. Tuj en ĉiuj gazetoj esperantistaj oni estus anoncinta lian konvertiĝon al esperanto, kaj en la neesperanta gazetaro oni estus orkestrinta belan varbkampanjon profitante de tiu evento.

A.- Nu, Schleyer rifuzas la honorigon. Imagu lian malafablecon. Oni volis danki lin pro lia sindono al la komuna ideo, kaj li rifuzas tiun pacan geston. Tio estas hontinda, netolerebla. Oni konis la fiulon, kaj sciis, ke li estas malamiko de la internacia lingvo. Kaj vidu, kion li sendis al ni : gazetaĉojn nelegeblajn ! Oni remanĝis volapŭkaĵojn. Kaj en la gazetaro en pli oficiala tono oni esprimis sian miron pri la malafableco de Schleyer, aŭ oni profitis rememorigi, ke ekde 1890, jaro de la skismo, Volapŭk ne plu ekzistas.

Cl.- Oni simple evitis mencii, ke tamen volapŭkaj gazetoj daŭre aperadas, ke asocioj ankoraŭ funkcias, kaj ke tion oni iom timas. Kaj ke la reformema Volapŭka Akademio konstruas novan lingvon, kiu allogas pli da personoj, ol oni estus dezirinta. Pri tio oni vane serĉos mencion en la esperanta gazetaro.

A.- Ni prenu ekzemplon, kiu okazis en 1900, dum la jaro de la pariza universala ekspozicio, kie ne nur esperanto havis sian budeton, sed ankaŭ Volapŭk kaj la lingvo de Bolak. La oficiala organo de la tiama esperantistaro, *Lingvo Internacia*, en la numero de junio 1900 kronikas :

Cl.- « *El Rusujo : Societo Espero en San Peterburgo sendis la sekvantan raporton. [...] Sekvas kunvena raporto kun kasspezoj. Poste troveblas interesa paragrafo, kiu bone priskribas la atmosferon, kiun ni ĵus elvokis : « La plej interesa parto de la kunsido estis legado de Pekoĵ Presaj, kiun faris s-ro K. Ostanieviĉ. Por tio li kolektis la plej malsaĝajn artikolojn pri Esperanto, kiuj estis presitaj en diversaj rusaj gazetoj dum la lasta tempo. Kelkaj artikoloj estis tute legataj, el la plej malsaĝaj do s-ro Ostanieviĉ citis nur kelkajn rimarkindajn eldirojn, kaj ĉiu gazeto ricevis aparte juĝon por sia artikolo. Ĝi nature elvokis iom da disputo kun gazetistoj alestintaj kaj la rezultato de tiu ĉi disputo estis nature bona por nia lingvo. »*

A.- Poste sekvas listo de personoj, kiuj estis elektitaj honoraj membroj de **Espero**. Tiu listo finiĝas per : « *kaj Johann Schleyer – kreinto de la Volapŭk.* »

A.- Du paragrafojn poste ni legas : « *Multaj personoj, elektitaj kiel honoraj membroj de Espero, sendis al ĝia komitato leterojn kun fotografajoj siaj. Por elekti s-ron Schleyer kiel honoran membron Espero havis la celon montri, ke sinjoro Schleyer, kiel ni esperantistoj –*

Historio pri la internacia lingvo, 10-a parto
La esperantistoj kaj Schleyer kaj Leteruĵo : la respondo de M. C. Butler
Claude Gacond, 240-a radioprelego, 1968.05.15 & 18

ano de la sama ideo, faris multe por ĝi kaj Espero devis per ia maniero esprimi al li sian estimon. Sed s-ro Schleyer resendis al Espero la honoran bileton kun surskribita vorto « refusé » kaj kun folieto presita, kiu penas montri al ni, ke laŭ la artikoloj de gazetoj de 1890 Volapük estis bonega kaj « multe uzata » lingvo ! »

A.- Kiel vi konstatas, al persono, kiu ne konas la tiaman klimaton, tiu teksto ŝajnas tute afabla. Sed renversu la situacion ! Kaj vi tuj komprenos ĝin. Post la ido-krizo en kelkaj urboj la esperanta grupo malaperis dum kelkaj jaroj profite al la idista. Imagu la situacion de Zamenhof, se tiam li estus ricevinta oferon fariĝi honora membro de tiu idista grupo, kiu festas la enterigon de la esperanta societo !

Cl.- Estas speco de nigra humuro, kiun la malfeliĉa Schleyer multfoje devis elteni. Tiu homo, kiu ŝatis la honorojn kaj suferegis pro la malprogreso de sia inventaĵo, devis duoble pli ol aliulo ofendiĝi pro tiuj honorigoj venantaj de la esperantistaro.

A.- Dum kelkaj minutoj, kiuj restas al ni hodiaŭ, ni volas danki sinjoron M. C. Butler, en Kingston, Britio, akademiano.

Cl.- Tiun ĉi fojon temas pri nia Esperanta Akademio !

A.- Li respondas al unu el niaj informpetoj. Pasintan jaron en prelego dediĉita al la unua esperantista gazeto ni diris tion :

Cl.- *Johano Dietterle, la kompilinto de la Originala Verkaro de Zamenhof, menciis en rimarko, ke en 1919 nur du kompletaj kolektoj de la unua esperanta gazeto ankoraŭ ekzistis. Ilin tiam posedis Edgar de Wahl en Reval kaj Eugen Wüster en Berlin.*

A.- *Jam en la kvina jaro de la esperanta erao Zamenhof, tiam redaktoro de La Esperantisto, ne plu posedis kompletan kolekton de tiu gazeto.*

Cl.- *Ni ne konas la hodiaŭan situacion. Eble kolektantoj kapablis formi novajn kompletajn kolektojn. Almenaŭ dank'al la kompilado de Johano Dietterle ni posedas la ĉefajn artikolojn verkitajn de Zamenhof por La Esperantisto. »*

A.- Akademiano M. C. Butler, leginte la tekston de nia prelego en *Sennaciulo*, decembro 1967, sendis al la redaktorejo de la SAT-organo tiun ĉi interesan informon :

Cl.- *« En via gazeto de Dec. 67 oni demandas pri la kieo de plenaj kolektoj de LA ESPERANTISTO. En korespondado kun s-ro A. Holzhaus en Indiana, Usono, li skribis al mi jene : El mia granda korespondado en diversaj landoj mi konstatis ke plena kolekto de La Esperantisto estas en 1) Biblioteko de Brita Esperanto-Asocio ; 2) British Museum ; 3) Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. 4) ĉe E. Wüster. Plenaj kopioj estas ĉe L. Minnaja en Romo kaj s-ro Holzhaus en Columbus, Indiana, Usono. Mi povas aldoni ke la BEA-volumo estas aĉetita antaŭ multaj jaroj de William Bailey, kiu por ĝi pagis 25 pundojn al H. T. Bailey /neniu parenco), k. enhavas notojn faritajn de William Bailey. Tiun volumon lia edzino post lia morto donacis al BEA. Pastro Wannemakers (Nederlando) de IKUE ankaŭ havas mikrofilman kopion de la tuta volumo, kiun mi faris por li en Londono. »*

A.- Ni dankas al akademiano Butler pro tiu informo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-